## Bjalistoka vicurbestro Aleksander Sosna vizitis Berlinon

Kiam jam antaŭ kelkaj monatoj prepare al la senvualigo de la nomtabulo „Zamenhofpark“ Johann Pachter informis la vicprezidanton de Bjalistoko kaj prezidanton de LKK Aleksander Sosna, tiu tuj deklaris sian volon viziti la parkon, okaze de sia sekvonta vojaĝo al Berlino.



Urbestrino Christina Emmrich montras al Aleksander Sosna la Zamenhofparkon en la mapo de Berlino. Ĉeestas (de maldekstre) Peter Kühnel kaj Johann Pachter.

La 28-an de aŭgusto tiu intenco realiĝis; li venis kadre de privata vizito, sed kun oficiala komisio de la urbestro. Post rigardado de la parko kaj de la apuda Esperantodomo, sinjoro Sosna kaj lin akompanantaj reprezentantoj de Germana Esperanto-Asocio, Esperanto-Ligo Berlin kaj TEJO estis akceptitaj de la distrikta urbestrino de Berlin-Lichtenberg Christina Emmrich kaj poste de d-ro Marek Prawda, la ambasadoro de Pollando.

Krom la rekono montrita pere de la akceptoj kaj la deklarita preteco subteni la agadon de la esperantistoj, grava rezulto estas la perspektivo de ĝemela rilato inter Berlin-Lichtenberg kaj Bjalistoko (kaj eble ankaŭ kun Kaliningrado, do triflanka – fakte jam ekzistas ĝemela rilato kaj inter Bjalistoko kaj Kaliningrado kaj inter Lichtenberg kaj Kaliningrado) iniciatita kaj akompanata de esperantistoj kiuj ja en ambaŭ (respektive ĉiuj tri) urboj estas sufiĉe agemaj.

Tio signifas, ke sin prezentas novaj ŝancoj, sed por uzi ilin kompreneble necesos homoj kiuj pretas investi tempon kaj laboron. *El EIBB 09/2009*

## Vizebürgermeister von Białystok Aleksander Sosna besuchte Zamenhofpark in Berlin

Aleksander Sosna, der stellvertretende Bürgermeister von Białystok und Vorsitzender des Organisationskomitees für den Esperanto-Weltkongress 2009 hat am 28. August 2009 Berlin besucht. Es gab ein Gespräch mit der Bürgermeisterin von Berlin-Lichtenberg Christina Emmrich, in Begleitung von Vertretern von D.E.B., ELB und TEJO. Bei diesem Gespräch wurde eine Städtepartnerschaft ins Auge gefasst. Dabei sagte Sosna zur traditionellen Verbundenheit seiner Stadt mit Esperanto: „Willst Du Geschäfte machen, sprich Englisch, willst Du Freundschaft schließen, lerne Esperanto!“

Die Bürgermeisterin dankte den Vertretern des Deutschen Esperanto-Bundes für die Entscheidung, die Geschäftsstelle des D.E.B. in Berlin-Lichtenberg zu installieren, wie auch für die Aktivitäten im Bezirk wie z.B. die Entstehung des Zamenhofparkes. Weiter wurde Zusammenarbeit auf verschiedenen Gebieten vereinbart. Außerdem soll Esperanto in das Programm der Volkshochschule aufgenommen werden.

Vom Rathaus des Bezirkes Berlin von Lichtenberg fuhr der Vizebürgermeister in Begleitung der Esperanto-Vertreter zum Hauptrathaus der Stadt, wo der Saal besichtigt wurde, in dem vor 101 Jahren Zamenhof eine Rede gehalten hat. Vom Rathaus ging es weiter zur Audienz beim polnischen Botschafter in seiner Residenz. In einer sehr angenehmen Atmosphäre wurde über Esperanto gesprochen, wobei besonders der letzte Weltkongress in Białystok behandelt wurde, als eine sehr gelungene Veranstaltung. Der Botschafter übernahm die Schirmherrschaft über das „Centra jubilea german-pola Zamenhoffesto“ am 18. Dezember 2009.



Johann Pachter, Irina Gerasimova, Dr. Marek Prawda, Aleksander Sosna, Henryk Wenzel und Peter Kühnel beim Besuch in der Botschaft der Republik Polen.

An diesem Tag ist eine Freundschaft zwischen dem Bürgermeister und den ihn begleitenden Esperanto-Vertretern entstanden. Sehr spät nachmittags traf er seine Frau wieder, die ihn mit Staunen in der Begleitung von neuen Freunden aus Berlin und Jalta empfing.

Die entstandenen Kontakte dauern an und weitere Gegenbesuche werden folgen, um die nachbarschaftlichen Kontakte mittels Esperanto zu vertiefen.